

el "Steloj kaj Leontodoj"
org. Kaneko Misuzu (1903-1930)
trad. Kirikae H.

**Sur la fundo de ĉielo blua kaj profunda
 Tiel, kiel etaj ŝtonoj en la maro,
 Ĝis la nokta ven' sinkintaj
 Tagaj steloj ne videblas.
 Ne videblas ili, sed estas.
 Ne videblas ili, tamen ne malestas.**

Kirikae H. skribas: La jaro 2009 baldaŭ fariĝos unu el miliardo da pasintaj jaroj. Spektante Ruĝ-kontraŭ-Blankan Kantobatalon vi atendas ree novjariĝon aŭ esperplene aŭ flegme, same kiel antaŭ unu jaro aŭ du jaroj...

Se kio ajn ĝoja aŭ malĝoja okazos al ni en la venanta jaro, ni amados Esperanton kaj esperantan literaturon kaj ĝuos nian propran esperantan vivon.

Bedaŭrata s-ro Toyokura Syōgo [tojokura ŝo:go] lasis al ni, SES-anoj, 100,000 jenojn. La monon mi konservas. En ĉijara ĝenerala kunsido ni diskutu kaj trovu la plej bonan kielon realigi lian karan volon.

Rememorante la grandan amanton de esperanta literaturo, mi salutas al vi sur la sojlo de feliĉa novjaro.



Sabataj kunsidoj en januaro: 9, 16, 23, 30 (1:00ptm. Kaderu)

Ĝenerala kunsido: 27-a de februaro